# Novjorka Prismo

**Numero 111** **Februaro 2002**


*La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia februaro kunveno . . .*

DATO: Vendredon, la 15-an de februaro 2002, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.
7:00 – Alex Karkovsky prelegos pri **Vojaĝoj tra Esperantujo,** pere de ŝercoj kaj anekdotoj. ★

## Protokolo de la kunveno de la 18-a de januaro 2002

Je 6:58 ptm, Tomaso ECCARDT malfermis la unuan kunvenon de la nova jaro. Ne ĉeestis gastoj. Ĉeestis nur 12 personoj. Tomaso menciis, ke nun estas la tempo de la jaro por pagi la membrecan kotizon por tiu ĉi jaro. Li demandis pri la akceptado de la protokolo. Rochelle F. GROSSMAN menciis, ke 25 personoj ĉeestis la Zamenhofan Feston. Rochelle ankaŭ diris, ke Semra ĈELIK ŝanĝis sian nomon al Emine.

Tomaso menciis pri la ŝanĝo de loko de la Esperanta somera kursaro de Sanfrancisko al Vermonto. Li ankaŭ menciis, ke la loko de nia kurso ĉe Stuyvesant perdiĝis. Tomaso proponis, ke eble la Open Center en Spring Street povos doni ĉambron. Tomaso invitas aliajn personojn esplori aliajn lokojn.

Rochelle ricevis poŝtkartojn el Pollando kaj el Nikaragvo. Ŝi ankaŭ ricevis noton de Rosa HELFGOT.

Tomaso LEONG parolis pri artikolo en la gazeto *Newsweek* pri aktoro George Clooney, kiu parolas Esperanton en la filmo *Oceans 11*.

Tomaso ECCARDT anoncis, ke li iris al kajo, apude al kie estis la ĝemelaj turoj. Li diris, ke li vidis nur aliajn konstruaĵojn, kaj ke la vido ne estis tiel interesa, kiel li esperis. Li devis akiri bileton por enirado al la kajo, akirebla kaj uzebla por nur tiu tago.

Tomaso menciis, ke Arturo BONETTI estas la nova Program-direktoro. Ni gratulis Arturon kaj dankis al Susan KOHN, la antaŭa Program-direktoro. Tomaso esprimis deziron, ke oni parolu al Arturo se oni havas ideon por prelego por la februara kunveno.

Post la anoncoj, Tomaso komencis sian prelegon pri la sep nanolandoj de Eŭropo. Tiuj ĉi landoj estas tre malgrandaj. Jen kelkaj faktoj pri la nanolandoj: unu el ili, Sanmarino, estas la plej malnova respubliko de la mondo. La aliaj nanolandoj estas Monako, Andoro, Vatikano, Luksemburgo, Malto kaj Liĥtenstejno. Sealand kaj Seborgo ne estas sendependaj. Unu industrio de la nanolandoj estas la farado kaj vendado de poŝtmarkoj.

La plejparto de la enloĝantoj de Vatikano estas vira (klerikoj). La svisaj gardistoj tie povas edziĝi. Filo de svisa gardisto havas permeson loĝi tie ĝis la aĝo de 25 jaroj. Ina bebo rajtas loĝi tie ĝis ŝi edziniĝas. La Vatikano estas tute urba.

La enloĝantoj de Andoro havas la plej longan viv-ekspekton de la tuta mondo. En Andoro, nur 20% de la enloĝantoj estas civitanoj. La kataluna estas la oficiala lingvo.

Monako havas la plej densan enloĝantaron. En Monako, nur 16% de la enloĝantoj estas civitanoj. Monako estas urba.

Malto havas la plej malnovajn konstruaĵojn. Malto havas sian propran lingvon. Malto estis angla kolonio. La industrioj de Malto estas konstruado kaj turismo.

Luksemburgo havas dancatan religian paradon. La dancistoj en la parado tenas naztukojn, unu persono tenante unu flanko de la naztuko, alia persono tenante la alian.

Liĥtenstejno ne havas armeon. La lasta soldato de Liĥtenstejno estis 95 jaraĝa, kiam li mortis en 1939. La signifo de la nomo "Liĥtenstejno" estas "luma ŝtono". Hans Adam havis la titolon "Prinz von und zu Lichtenstein". En la pasinteco, la reĝa familio loĝis en Aŭstrio. La konata industrio tie estas la farado de falsaj dentoj. Sanmarino donis honoran civitanecon al Prezidento Lincoln. Sanmarino estis unu el la papaj ŝtatoj antaŭ 1870.

Ni havis mallongan diskutadon pri la nova unuo de mono, la Eŭro. 18 landoj uzas Eŭrojn. Montenegro kaj Kosovo uzas Eŭrojn. Je unu flanko estas signo de la eŭropa unio, je dua flanko estas naciaj signoj. Vatikano kaj Sanmarino uzis Lirojn, Andoro uzis Frankojn kaj Pesetojn, kaj Monako uzis Frankojn antaŭ la adopto de la Eŭro.

Je 8:10 ptm, Tomaso komencis diskutan rondon pri kiel plibonigi la klubon, la kunvenojn kaj la *Novjorkan Prismon*. Ni diskutis aliajn aferojn, ekzemple:

Ni devas allogi novajn klubanojn. K-mart havas financajn problemojn. Ni devos paroli al la gvidantoj de UFT por eksciі ĉu ili lasos nin uzi spacon en sia nova konstruaĵo post kiam ili translokiĝos. Eble estos malsaniga aero nun en la nova loko. Ni debatis ĉu ni: donu al personoj celon por lerni la lingvon; kontaktu eksmembrojn kaj eblajn membrojn; uzu reklamon en ĵurnalo kiel *Time-out*. Barnes & Noble gastigas franclingvajn kursojn ĉe sia filio ĉe 23-a ŝtrato kaj 7-a avenuo; eble ni povos doni kurson de Esperanto tie.

Ni diskutis pri kiel plimultigi la membraron, kaj kiel havi pli multajn gastojn. La turisma sekcio de nia retpaĝo ne estas ĝisdata kaj preciza. Ekzemple, estas 5854 seĝoj en Radio City Music Hall. Ni decidis nek ŝanĝi horaron, nek ŝanĝi la tagon de la formala kunveno, kiu restos la trian vendredon. Ni devas havi pli da kontaktoj kun aliaj NRO-oj. Ni povas interŝanĝi prelegantojn kun aliaj kluboj. Ili povas paroli angle, kaj poste ni povas havi diskuton en Esperanto. Kelkaj temoj estas tro tedaj. Ni devas serĉi novajn temojn.

Alex KARKOVSKY proponis, ke ni iru al kunveno de la Toastmasters klubo ĉe 52-a Strato kaj 6-a Avenuo kaj vidu kiel ĝi funkcias. Li diras, ke tiu klubo havas paroligan etoson. La kunvenoj okazas je 6:15 ptm, la unuan kaj la trian ĵaŭdojn de la monato, ĉe 1301 Avenuo de la Amerikoj, ĉe la dua etaĝo de la bankkonstruaĵo Credit Lyonnaise.

Je 8:55 ptm Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Ok personoj iris al la restoracio My Cousin Vinny's por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis:*
*Stuart GREEN*

## Prepar-konferenco por MPDE

Kun aliaj homoj de ne-registaraj organizoj (NRO-oj), mi ĉeestis iom de la konferenco en Novjorko, kies celo estas prepari por la Monda Pinto-konferenco en Johanesburgo pri Daŭrigebla Evoluiĝo (MPDE). Ĝi estos daŭrigo de la ideoj de la fama konferenco en Rio-dejanejro antaŭ dek jaroj. Ĉi foje la emfazo ŝajnas esti sur la malegala distribuo de povo kaj riĉeco kaj la malbonaj rezultoj de tutmondiĝo. Scienco kaj limigo de naskiĝo havos minimuman rolon. Virinoj, junuloj, sindikatistoj kaj farmistoj havas la plej grandan spacon inter NRO-aj raportoj. ★

– Tomaso ECCARDT

## Letero

Mi antaŭnelonge ricevis la jenan leteron : *Estimata Thomas, . . . mi jus ricevis la januaran "Novjorka Prismo," kaj mi legis la membro-liston, kaj mi ne trovis mian nomon. Kial ne? . . .*

*via fidela amiko, Norman B. Calvert*

Kara Norman,

Dankon pro la granda mona donaco, kiun vi sendis kun via kotizo ĉi jare. Ĝi fakte sufiĉis por ke vi estu plena membro, sed vi markis la skatolon "individuoj ekster la metropola regiono de Novjorko". Do ni supozis, ke vi volis resti ne-membro. Pro tio vi ne aperis en la listo. Venontan jaron, bonvolu marki la skatolon "plena membro," se vi volas, ke via nomo aperu en la januara membro-listo. Iu ajn rajtas esti plena membro, inkluzive tiuj, kiuj loĝas ekster nia regiono. La ne-membra klaso ekzistas nur por doni rabaton al tiuj, kiuj ne povas ĉeesti klubkunvenojn. ★

*Samideane, Tomaso ECCARDT*

## La Flambirdo



Nun vi povas legi japanan MANGA libron en Esperanto!

*La Flambirdo*, eble la unua manga libro tradukita al Esperanto, estis donata al ESNY klubanoj per Hiroshi Sano, la prezidanto de la Toyonaka Esperanto-grupo en Osaka, Japanio. Se vi interesiĝas legi ĝin, bv. pruntepreni ĝin de Tom Eccardt. *La Flambirdo* estis oficiala memorajo de la 88-a Japana Esperanto-Kongreso 2001, ĉar la kongresurbo Takarazuka estas la kreskurbo de la aŭtoro, Osamu Tezuka (1928-1989), sendube la plej fama manga-isto en japanio. ★

– *Maki SANO*

## JES 2002

De la 15-a ĝis la 17-a de februaro 2002 okazos JES (Junulara Esperantista Semajnfino) en Filadelfio. Tie ni havos amuzaĵojn per Esperantajn filmojn, ludojn, konversaciojn, ktp. Ni renkontos ĉe la Chamounix Mansion kaj ĝi kostos $26. Estas plejparte por 30-jaruloj kaj pli junaj. Ni esperas renkonti vin tie! Por pliaj detaloj oni povas kontaki min telefone aŭ e-poŝte, aŭ iru al la TTT-paĝo: *http://unumondo.com/cgi-bin/wiki.pl?Filadelfia_JES*. ★

– *Chuck SMITH,*
*(717) 903-2989, <msochuck@yahoo.com>*

## Sony Plaza kaj WEF

La Monda Ekonomia Forumo de Davos, deviis de sia kutime definita kunvenejo kaj okazis ĉi tie en Novjorko. Do ni devis diveni alian lokon por kunveni. Tio defiis nin dividiĝi en du grupojn. Unu grupo havis la ideon veni al la restoracio Cosi, la alia (legu malsupre) diverĝis al la kafejo en Borders Books. Espereble ekde venonta monato, ni ne devos demandi "dove?" ★

– *Tomaso ECCARDT*

La unuan dimanĉon de la monato okazis nekutima renkontiĝo. Ĝi estis ekster la kutima loko pro manifestacioj, en la kvartalo, kontraŭ la Monda Ekonomia Forumo (WEF). Tomoko, Marta, kaj mi iris al Sony Plaza kaj atendis kelkajn minutojn. Poste ni rigardis miajn Esperantajn fotojn. Ni ankaŭ dikutis pri la manifestacioj.

La tagon poste mi faris ekspozicieton ĉe Community Church, 35-a Strato. Ĉi estas unitariana preĝejo. Okazis diskuto por mil homoj pri WEF kaj pri la speciala forumo en Brazilo. Mi havis dudek konversaciojn pri Esperanto inkluzive kun irlandanino kaj iranino, kiuj konis samlandajn esperantistojn. Tri homoj rakontis, ke ili vidis novan teatraĵon de Tony Kuŝner, Nobody Kabul, kiu donas rolon al Esperanto. ★

– *Neil BLONSTEIN*

## Konfirmado

Se vi ĉeestis mian prelegon pri la sep eŭropaj nanolandoj, kaj vi interesiĝas, mi konfirmis, ke la Kavaliroj de Malto ja estas observanta membro de Unuiĝintaj Nacioj. Ankaŭ, Malto ja estas nanolando – ĝi estas malpligranda ol Andorro aŭ Luksemburgo, sed pli granda ol la aliaj kvar. Vi povas facile rekonfirmi tiujn faktojn per la Interreto. ★

– *Tomaso ECCARDT*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Februaro 15**

ESNY KUNVENO
Prelego de Alex Karkovsky
**"Vojaĝoj tra Esperantujo"**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Marto 3**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 112)

**15**

ESNY KUNVENO
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## Baldaŭ vizitos

Mi unue sendis mesaĝon al UEA-delegito d-ro Pierre C. Jelenc. Laŭ lia informo mi ekscias vian nomon kaj retadreson. Mi estas 35 jaraĝa japana esperantisto, ankaŭ mi estas UEA-delegito, bonvolu konsulti la paĝon 214 de la Jarlibro 2001 de UEA.

Hazarde mi vizitos al la urbo New York la 18-an ĝis la 21-a de (februaro). Ĉi foje mi unuafoje restados en Usono. Belajn artaĵojn preferas mi, por tio mi esperas viziti al The Metropolitan Museum kaj MOMA kaj aliaj.

Se vi havos liberan tempon, mi esperas renkonti vin en NY, kiu estas nekonata loko por mi. Estas granda plezuro, se vi akceptos mian proponon. Antaŭdankon ★

– *SOMEKAWA Takatosi*
*<ikeda-somekawa@wombat.zaq.ne.jp>*

## Volas korespondi

Saluton el Rusio! Skribas al vi juna komencanto. Per serĉanta sistemo mi trovis vian TTT-paĝon kaj decidis peti vian helpon. Mi interesiĝas pri via lando, historio, kaj politiko. Mi dankus vin, se vi helpus min trovi korespondamikojn. Mi deziras ĉiun bonan en la jaro 2002. ★

*Amike, Alekseo, <da@kaluga.ru>*


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Koresponda Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (718) 671-5699
**Program-Direktoro** Arturo Bonetti (718) 257-6091

**Novjorka Prismo**
Numero 111 – Februaro 2002
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com

© 2002 Esperanto Society of New York